

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2016

Vendredon la unuan de aprilo

64a jaro

Kalendaro

Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la **18a 30**.

Mardo la 5a de aprilo (sem. 14) – *tirsdag*

La kranko kiel kultur-memoraĵo – aŭ kiel tradukekzerco, vd. kunsendaĵon. *Sveiva som kulturminne – eller som oversettelsesøvelse. Se vedlegg.*

Lundo la 18a de aprilo (sem. 16) – *mandag*

Oni povas loĝi en urbo, proksime al butikoj, laborloko, lernejo kaj stacio, aŭ eksterurbe en freŝa aero kun propra ĝardeno. Kion vi preferas, kaj kial? Ĉu plani loĝadon dense/alte aŭ dise/ verde? *Man kan bo i byen, med kort vei til butikk, arbeidsplass, skole og trikk/buss, eller utenfor, i frisk luft og med egen hage? Hva foretrekker du, og hvorfor? Skal det bygges høyt og tett eller grønt og spredt?*

Mardo la 3a de majo (sem. 18) – *tirsdag*

Du niaj membroj vojaĝis al Filipinoj kaj subtenas familiojn tie. Ĉu pli bone helpi konatojn tiel rekte ol subteni tra helporganizo? *To av medlemmene våre har reist til Filippinene og støtter familier der. Er det bedre enn å sende bidrag gjennom en hjelpeorganisasjon?*

Mardo la 7a de junio (sem. 23) – *tirsdag*

Malnovaj norvegaj metioj. Traduk-ekzerco. *Tradisjonelle norske håndverk. Oversettelsesøvelse.*

Lundo la 20a de junio (sem. 25) – *mandag*

Ĉu UEA aĉetu – aŭ luu? – duan domon en Roterdamo, kiel tranoktejon por volontuloj? *Bør UEA kjøpe – eller leie? – et hus til i Rotterdam, til overnatting for medhjelpere?*

Lundo la 11a de julio (sem. 28) – *mandag*

Kromkunveno kun japanaj gastoj: Akira Saiki, emerita instruisto, delegito de UEA, kaj lia edzino. *Ekstramøte med japanske gjester, Akira Saiki, pensjonert lærer, UEA-representant, og kona hans.*

OKAZIS

Mardon la 2an de februaro

Ni refoje traktis volapük (vd. la 19^{an} de januaro lastjare). Ĉi-foje ni detale komparis ĝin kun Esperanto – la lingvon mem kaj la movadon. Ni trovis ambaŭkampe plurajn paralelaĵojn kaj konstatis diferencojn. Fine ni diskutis kiel la sperto pri volapük helpis aŭ malhelpis al Esperanto kaj ties movado.

Lundon la 15an de februaro

Leif Arne Storset klarigis kiel iu kreis per vasta algoritmo la interretan monon *bit coins* kaj ke la merkato decidas aŭ ŝanĝas ĝian valoron same kiel la kurzojn de aliaj valutoj. Kvankam virtuala, ĝi principe povas funkcii same bone kiel monbiletoj, kiuj ne estas ankr-itaj en oro. Kiel ajn, diverseco de valutoj certigas pli stabilan ekonomion.

Vizitkartoj

NEL mendis stokon da vizitkartoj. Haveblaj en Esperantonia.



La simbolo estas verdkolora. La dorsflanka teksto estas:

For å få vårt nyhetsbrev Esperanto-nytt tre ganger i året, skriv til:
info[a]esperanto.no

gratis nettkurs: www.lernu.net

www.duolingo.com

ESPERANTO: LETTLÆRT OG LEVENDE

La nova *Esperanto-nytt* videblas interrete ĉe esperanto.no/e-nytt .

Pri ĝi legu en *Norvega Esperantisto* 4, p. 5 – 6 kaj n-ro 5, p. 3 kaj 4.

Jarkunveno / Årsmøte, mardon 1an de marto

Partoprenis 5 (kvin) membroj.

Ni faris diversajn korektetojn kaj aldonetojn al la versio de la jarraporto dissendita retpoŝte la 22an de februaro.

Ĉefaj aldonoj:

Sub ”klubprogramoj”

i) iom pli detale pri la kromkunveno kun Aleksandro Melnikov

ii) pli specife pri la kunvenoj kiuj ne okazis en la planita formo.

Aprobiĝis la **jarraporto** kun la akceptitaj ŝanĝoj.

4. La **jarkalkulon** prezentis la kasisto, Harald Rygg.

Rimarkigo. Sub “konto de funkcio”:

“Subvencio” estas de la studasocio al ni minus nia subvencio al gasto.

Bilanco je 31.12.2014. Estu... 2015

Ni atendas de la kasisto de NEL membroliston kun kalkulo de la kotiza pago al la klubo, kaj informon pri la kalkulo de la telefonelspezoj.

La kalkulo aprobiĝis, kun rezervo pri ĝustigo de la telefonelspezoj kaj la membronombro – kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn.

5. Ricevitaj proponoj:

1. La prezidanton elektu la jarkunveno rekte, kaj la elektita estraro disdonu la ceterajn postenojn inter si.

Ni konstatis ke estus malfacile trovi kandidatojn se, elektite kiel estrarano, oni ne scius kiun postenon oni devos plenumi. Cato Haugen retiris sian proponon.

2. La estraro uzu la plej bonajn teknikajn solvojn/ metodojn por antaŭenigi sciojn pri Esperanto kaj faciligi la lernadon de la lingvo.

Ni konstatis ke elektante metodojn oni devas ankaŭ konsideri la koston. Cato Haugen retiris sian proponon de statutŝanĝo, sed la ĝenerala kunveno petis la estraron ĉiam laŭeble uzi modernajn teknikajn helpilojn por realigi la klubajn celojn, helpe de aliaj kompetentuloj.

6. Elektioj

Matias Jentoft transloĝiĝos al Finnlando aŭtune kaj ne deziras reelekton kiel estrarano.

Ni reelektis la jenajn:

Prezidanto: Kjell Peder Hoff

Sekretario: Douglas Draper

Kasisto: Harald Rygg

Anstataŭantoj: Ni reelektis Ellen Dalen.

Revizoro: Terje Meier (reelektita kondiĉe ke li akceptos)

Kluba reprezentanto en la domkomisiono: Ni reelektis Kjell Peder Hoff.

Anstataŭantoj (po unu) por la estraro, la revizoro kaj la dom

komisiono mankas.

Elekta komisiono: ne elektita.

[Laŭ protokolo de Douglas Draper

La reviziitaj jarraporto kaj jarkalkulo estas dissenditaj 7.3 al la membroj kun retroŝto. Ni pretas sendi ilin papere al membroj kiuj petas ilin.

Info-budoj en foiroj?

Info-budoj en foiroj k.s. donas bonan sed maloftan okazon renkonti la publikon – precipe junulojn – kaj informi pri Esperanto. Ofte jun(et)uloj tute ne aŭdis pri ĝi, kaj ne imagas ke tia lingvo povas ekzisti kaj esti uzata.

Sed tiaj konferencoj kaj foiroj ne tre oftas. Foje ili okazas loke, for de la urbocentro, ekz-e en biblioteko. **Se vi scias / aŭdos** pri tia aranĝo, kie eblus starigi informbudon (senpage aŭ malmultekoste), bv. sciigi tion al ni.

Viktig: *Si fra om du vet om en messe eller festival e.l. hvor vi kan få satt opp en info-bod eller en liten utstilling. Folk vet ikke at Esperanto finnes!*

Ĉu iu volas lui kunvenĉambro? – leie møterom?

Nun Cato Haugen forigas sian librokolekton, tiel ke la tuta kunvenĉambro liberiĝas por luo.

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for én eller flere kvelder? Eller en helg? Vi trenger leieinntekter! Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

Kromekzempleroj ...

En la klubejo ni havas grandan kolekton da **kromekzempleroj de internaciaj periodaĵoj**: *Heroldo*, *Sennaciulo*, *Literatura Foiro*, *Kontakto* k.a. Senpage preneblaj!

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18*, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
Tramo 17 al Sinsenterrassen aŭ buso 31 al Rosenhoff aŭ metroo 6 al Sinsen.
Vd. pli detale interrete ĉe esperanto.no/oslo => "vojklarigo".

* inng. Schouterrassen. www.esperanto.no/oslo Retroŝto: oficejo[a]esperanto.no
Bankkonto 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper